



La Suda Kruco

Oficiala Organ de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).—

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj. aŭ
24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.—

Anoncoj: Por 3 Linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 45

Melburno (Melbourne), Australio.

10 Marto 1924



LA BRISBAŬA FESTO.

Starantaj: sinjoro Kidd; fraŭlino Cable kun fraulineto Helen Sycamore; sinjoro Sycamore, sinjorino Sycamore, sinjoro Proctor.

Sidantaj: sinjoro Hadfield; fraŭlino Carrick; sinjorino Kidd; fraŭlino Stuart; fraŭlino Fraser.

Sur la Tero: fraŭlino Alphen; sinjoro Poon.

BULGARIA AND THE VENICE CONGRESS.

The Bulgarian Ministry of Commerce, impressed by the proceedings of the congress of commercial interests at Venice, and their strong support of Esperanto, has taken steps to bring the matter before the commercial organisations of Bulgaria. Copies of the report and resolutions of the congress have been sent by the Ministry to the Chamber of Commerce of the country, accompanied by a circular recommending the subject to their favourable attention.

HOW ESPERANTO HELPS SCIENCE.

In the middle ages the scientific world had its international language—Latin. Who knew not Latin was dumb. But Latin was lost, and for centuries the scientists have had to learn various languages in the attempt to keep acquainted with scientific thought in other countries. Professor Todhunter, of mathematical fame, was reduced to learning Russian at the age of seventy-odd, since a treatise which might or might not be of value to his work was published in that language.

Now, however, the tendency is to make use of the modern international language Esperanto. The rise and development of the national languages (a process which we can see before our very eyes), though providing so many more vehicles for the adequate expression of precise thought, have erected a tower of Babel in the great city of knowledge, which can only be laid low by the use of a common means of communication. And so, in the cause of science and progress, Esperanto is a valued aid.

An instance—only one of many—is an article by Dr. M. Toplanski, of Vienna, on climatological investigation. The subject is one of world-wide interest and the article was written originally in Esperanto, and is thus at once available for the whole world. Written in German or Russian, it would have had to await translation into many languages, including perhaps translation from a translation, always a risky process. The Director of the Central Observatory of Meteorology in Tokio almost at once had the article reprinted in the journal of the Japanese Meteorological

Society, in its original form with a Japanese translation. As time goes on the necessity for any translation will, of course, disappear.

Only a minor example, but . . . la venton montras pajlo.

THE BRITISH ASSOCIATION ON ESPERANTO.

It will be recalled that in 1921 the British Association for the Advancement of Science appointed a committee for the study of the problem of an international language. The committee recommended a synthetic language of the type of Esperanto and Ido regarding the resemblance between these as much greater than the difference, and did not more fully define its attitude.

Now, however, the committee has definitely decided in favour of Esperanto, that language being so much more widely disseminated than any other, and because, if Esperanto is not perfect, experience has shown that it is quite satisfactory for all ordinary purposes.

This decision has been communicated officially to the League of Nations Union, and although it does not bind the committee's parent body (the International Research Council), it should have great influence when Esperanto is again before the League of Nations Assembly.

This interesting news is drawn from an article by Dr. E. Howard Tripp, Secretary of the British Association Committee, which appears in the first issue of "International Language," just to hand from the British Esperanto Association. This is a thoughtful and well-prepared publication, all in English, and combined as it is with "La Juna Lernanto," with its specimens of simple Esperanto, it should have noteworthy propaganda value outside our movement.

CITIZENS OF THE WORLD.

He was a typical "foreigner," of nuggety build, swarthy complexion, well dressed. His eyes and a square high forehead indicated intelligence and good humour. The writer was strolling near the water front; a huge liner was disgoring its living cargo.

With a quaintly comical, interrogative expression on his face, the stranger approached: "Bonan tagon, sinjoro"; the words were accom-

...nied by a wistful manner, almost appealing; the evident anxiety to be understood was touching. Without waiting for a reply he jerked out another sentence: "Ĉu vi povas paroli karan lingvon"?

The joy in the face of a boy who has just found a marble is as nothing compared with that of my new-found friend when I replied "Certe." But he shot both hands; tears showed in his eyes; came a flood of words of pleasure, joy and gratitude. No longer were we strangers—"foreigner"—to each other. The artificial boundary of race and nationality disappeared as if by magic. He was understood; I was understanding. He was from Jugo-Slavia, able to speak only his mother-tongue and Esperanto—the international language. A stranger, alone in a strange country, had found a friend who could understand his troubles, trials and difficulties in this new land. . . .

Time passed; the small kindnesses which I had gladly done were forgotten by me; our friend had secured a position "out back," had "made good" and ultimately became a flourishing commercial man, a good citizen of Australia—he already was a citizen of the world.

And I? I was up against it; things had somehow gone wrong with me. Sickness, unemployment, bad debts, all combined to place me perilously near the "down and out" line. It was evening, hot, oppressive;

my wife and I sat thinking, thinking, thinking; to-morrow was to be our last day in the old home, the home we had struggled for side by side, near in, year out. The mortgagee had foreclosed; the house must be sold and we must go. But where? Tears stood in the eyes of my wife. Everything seemed black to her and I was a sick man.

A motor-car sounded in the quiet little suburban street; it stopped. A rapid step, a knock at the door, a

voice in good English demanded to see me. In fear and trembling my wife replied that I was sick. The first step of the visitor entered the room; it was my Jugo-Slavian friend of the water-front.

He had heard something, somehow, somewhere, about our troubles. In faultless English he talked cheerfully, hopelessly, reminded me of our first meeting, and of our talk in Esperanto. "You were indeed a friend to me, then; now it is my turn. To-morrow your home will be yours again in very truth. To-morrow we will get the best physician in the city, soon all will be well, and if ever you talk to me about repayment or thanks, well—don't."

What a knowledge of Esperanto does for individuals it is doing for the peace of the world, for the brotherhood of man and for universal understanding. Ĉu ne vere?

H. Byatt.

AL VIENO !

Nia bone konata kaj agema samideano el Sidnejo, sinjorino Alice Scammell, vicprezidentino de la Sidneja Esperanto-Societo, en Aprilo forvojaĝos Anglujon, kun la intenco poste ĉeesti la XVI—an internacian kongreson de Esperanto en Vieno (Aŭstrio).

Aŭstralio estos tie! Feliĉan ĉesteton kaj bonan revenon, sinjorino.

LITERATURA KONKURSO.

Jen la rezulto de la konkurso anoncita en nia novembro numero:

1-a premio: sinjoro Lauri Laiho; originala skizo "La Pento."

2-a premio: sinjoro Lauri Laiho; traduko el "The Crock of Gold" de James Stephens, titolita "La Nekrologio de Edzino."

3-a premio: sinjoro H. Byatt; originala skizo "Frua Printempo."

HALL'S BOOK STORE

'Phone: Windsor 6081.

Books and Music bought at your home.

Specialist in Secondhand School and College Books.

Secondhand Music.

264 CHAPEL STREET,

— PRAHRAN —

(Opposite Town Hall).

Libraries Valued.

Full Stock of Esperanto Books.

Agent for "LA SUDA KRUCO."

SIDNEJA. ESPERANTO-SOCIETO : JARKUNVENO.

La sekretario de la Sidneja Esperanto-Societo (sinjoro L. E. Fosto) en 31 januaro prezentis al la membroj la jarraporton pri 1923.

Agado ja ne mankis dum tiu jaro. La ĉefa okazintaĵo estis nature la IV —a Aŭstralazia kongreso, en Pasko. Ĝiaj fruktoj estas videblaj en pli efika propagando kaj pli bona intereso kaj kompreno pri nia movado. Precipe helpis al tio la gazetaro kaj kinematografoj.

Stariĝis nova grupo ĉe la universitato, kio povas multe helpi, preparante la vojon por estonta oficiala konsiderado de Esperanto.

Novaj kursoj estas starigitaj en Newcastle kaj Nelson Bay, kaj en la Sidneja kvartaloj Ashfield, Marrickville kaj Bankstown. . . Novaj delegitoj de UEA estas elektitaj en Bob's Farm, Newcastle, Bogan Gate, Guyra, Mount Victoria, Nelson Bay kaj Nowra.

Ĉe la kunvenoj en Sidnejo oni prezentis bonan programon de paroladoj, legado, konkursoj kaj praktika elmontrado. Krom tio, okazis diversaj festoj.

La jenaj oficistoj estas elektitaj :

Prezidanto : sinjoro F. V. Taylor (reelektita por la tria fojo).

Vic-prezidantoj : sinjoro E. A. Pryke kaj sinjorino A. Scammell.

Sekretario : sinjoro L. E. Fosto (reelektita por la kvina fojo).

Kasistino : fraŭlino Fairfield :

Bibliotekisto : sinjoro J. Soboleff :

Revizorino : fraŭlino I. Corrigan.

NOVA DELEGITO DE UEA EN BRISBANO.

En la loko de fraŭlino Marion Fraser, eksiĝinta pro malsano, oni elektis kiel delegiton de UEA en Brisbano (Kvinslando) sinjoron L. W. K. Wirth, kies adreso estas Kent's Buildings, Adelaide-str. ; Brisbane.

JARKUNVENO DE BRISBANA KLUBO.

La 1-an de februaro okazis la jarkunveno de la Brisbana Esperanto-Klubo. Oni elektis la jenajn oficistojn :

Prezidanto : sinjoro A. E. Mason Beatty.

Vic-prezidantoj : fraŭlino Marion Fraser ; sinjoro T. Suess.

Sekretario : sinjoro A. J. Sycamore ; adreso : ĉe sinjoro W. Hartley, Carlton-str. ; Highgate Hill, South Brisbane.

Konsilanto de AEA : sinjoro N. Poon.

La Klubo kunvenas en la unua kaj la tria vendredoj de ĉiu monato, ĉe sinjoro Wirth, Kent's Buildings, Adelaide-st Oni intencas vigle ataki la gazetaron per artikoloj kaj reklamado.

KONCERTO DE JAMES WALKER.

Por la kaso de la Sidneja Esperanto-Societo koncerto de la genia knabopianisto James Walker, pri kiu ni raportis en la decembra numero, okazis en 20 februaro, organizita de sinjoro Stefano Polotynski, lia instruisto.

La dek-unujara knabo ludis kun frapanta lerteco serion de klasikaj pecoj, inter ili komponaĵoj de Chopin, de Liszt kaj de sinjoro Polotynski, . . Lian aplomban kaj celkonscian ludadon aparte laŭdis la gazetoj.

Aliaj numeroj de la programo estis violonsoloj de sinjoro Henriko Staell kaj kantoj de sinjoro C. M. Dunshea. Ĉi tiu kantis interalie "Siberia Elegio"-n, verko de sinjoro Polotynski, kiu mem akompanis sur la piano.

BRISBANANOJ FESTAS.

Agrablan kampfeston havis la Brisbana Klubo en 27 januaro ĉe Petrie, agrabla festloko apud la pitoreska Pine-rivero, dek sep mejlojn for de la urbo. Oni ĝojis revidi inter la festantoj la pioniron de la movado en Brisbano, fraŭlino Marion Fraser, resaniĝintan de longa malsano.

Sensacion kaŭzis ĉe unu stacio laŭtaj krioj de "Esperanto ! Esperanto !" Kapojn oni elmetis el la vagonoj, kaj trovis, ke tio estas sendito de unu samideano ne povanta partopreni la feston, kiu tamen sendis ĉokoladajn bombonojn "por la samideanidoj."

Per banado kaj promenado oni ĝue pasigis la tagon. . Pli seriozajn aferojn oni ankaŭ ne forgesis : okazis ĝenerala diskuto pri la movado en Kvinslando kaj planoj por propagando.

RECENZO.

Universala Esperanto-Asocio en
Jugo de la Esperantistoj.—Eldoni-
de UEA, Genevo. 55 paĝoj.
Ne estas klare videable la bezono
por ĉi tiu libro, konsistanta el atestoj
de diverslandaj samideanoj pri la uti-
lenco de UEA, afero jam bone konata.
Al ni ŝajnas, ke pli bone la Asocio
devus uzi sian negrandajn monri-
medojn, ol per eldonado de tia verko.

KRONIKO.

SIDNEJO.—Treĝuata festo ĉe la
Nacia Parko. Parolo de sinjoro E.
Thomson kun helpo de kinemato-
grafo je temo "Ni estu gajaj!" Ni
estis gajaj.

MELBURN.—Koncerto de Raciis-
ta Grupo, por helpi la kason de la
Zamenhof-monumento. . Membroj de
la grupo kaj ankaŭ de la Melburna
Esperanto-Klubo prezentis amuzan
programon de kantoj, komuna kan-
tado kaj ludado de ŝaradoj. Ni ne
baldaŭ forgesos la improvizitan "oper-
on," kiun prezentis fraŭlino Elsie
Godfrey kaj sinjoroj J. G. Pyke kaj
J. Davidson!

LA PENTO.

(Unua Premio en Konkurso de AEA)

Kio okazas ĉirkaŭ mi?

La aero estas peza, dika. Kvazaŭ
ke ĉiu flanko alŝteliĝus fantomoj . . .

Fantomoj—grizaj kaj kuriozaj. Kun
malica ŝojo ili grimacas al mi, kaj
liaj trarigardoj ardigas la cerbon,
malakrigas la pensojn.

Oni devus ekflamigi grandan tor-
on kaj lumigi ĉiujn angulojn. Tiam
li eble malaperus . . .

Hieraŭ vespere ĝi okazis, ke mi per-
dis la plej fidelan animon, kiun mi

ĝis nun trovis. Mi estis ĉe ŝi, tiu alia
. . . .

Ŝi estis surmetinta sian plej belan
robon kaj pasis malrapide al mi, tie,
kie mi sidis en la krepuska ĉambro,
lumigita nur per unu kandelo.

Ŝi estis bela. Neniam plifruue mi
vidis ŝin tiel allogema. Ŝi eksidis sur
la kanapo, proksime al mi, kaj ridetis
ĝue.

Dum la antaŭaj fojoj ni ĉiam ĉu
ludis ŝakon ĉu interparoladis pri
literaturo, sed nun mi ne vidis la ŝak-
tabulon. Kaj mi estis subite kaptita
de ekscita penso : ŝi aranĝis tiel . . .

Kaj mi perceptis la ebrigan odoron
de ŝia estaĵo. La sango eksusuris en
miaj vejnoj kaj ekbolis en la kapo.
Mi forgesis la belajn promesojn kaj
ne plu povis kontraŭstari la tenton . .

Sed ebrico vaporigas, narkoto
malaperos kaj la animo krias pli mal-
sata kaj pli soifa, ol antaŭe.

Kaj mi sentis la valoron de la fide-
la koro, kiun mi estis perdanta, kiel
oni ĉiam nur poste sentas valoron de
iu perditaĵo. Mi plu ne estas egala
al tiu pura animo.

Mi ja sciis, ke la animo volas veron,
ne malveron nek eksciton.

Mi pentas kaj mia koro estas sufo-
kiĝanta.

Originalo de Lauri Laiho.

ESPERANTO EN RUSUJO.

La redakcio de "Verda Lumo"
(Ŝanghaj, Ĉinujo), prezentante al
siaj legantoj la jenan interesan rapor-
ton, diras :

"Rusujo estas nasklando de nia
sankta lingvo, kaj tie antaŭ la revo-
lucio sin trovis ja plej multe da niaj

PHILLIP ISLAND

"Redcliffs," Newhaven.

The Ideal Tourist Resort.
6 hrs. from Melb. by boat and rail.

Accommodation for 50 Guests.
———First Class Table.———

Good Piano, Spacious Bathrooms, Croquet Lawn, Tennis Court, Good Boating, Fishing,
Swimming and Shooting. Picnic Parties Arranged. Esperanto Spoken in the House.

Mr. E. S. BIGELOW, "Redcliffs," NEWHAVEN, PHILIP ISLAND.

pioniroj, multaj esperantaj grupoj kaj gazetoj. Post 1917 ni audis tre mal multe pri nia movado el tiu chi lando. Ni chiam penas komunikighi kun rusaj esperantistoj, sed estis tre malfacile ricevi iajn kredindajn informojn. La aŭtoro de tiu chi artikolo estis antaŭe studento de Orienta Universitato en Moskvo, kie li konis multajn rusajn samideanojn kaj ellernis Esperanton de ili. Jhus reveninte de Rusujo li skribis por ni la resumon pri nia movado en Soviet-Rusujo, kiu certe estas bona informo pri tiu chi temo. Dankeme ni ghin publikigas tie chi."

La monda milito malhelpis esperantan movadon en chiu landoj, sed la movadon de Esperanto en Rusujo ne nur malhelpis la monda milito, ghin malhelpis ankau la interna milito. Post la rusa revolucio multe da esperantistoj iris al la fronto, kaj, kiam la interna milito chesis, malsatado daŭris kaj ili devis reveni al vilagho. Tial ghis la periodo de nova ekonomia politiko nia movado en Rusujo estis malpli vigla, ol antau monda milito.

En la jaro 1921 la rusa esperantistaro komencis labori, sed bedaŭrinde ilin ree malhelpis la rusa registaro. Kelkaj esperantistoj volas unuigi esperantismon kun komunismo; certe multe da malnovaj samideanoj tion ne konsentis kaj skribis leterojn al eksterlando pri la situacio de rusaj esperantistoj. Ili ankau kritikis pri la bolshevismo, tial multaj el ili estis arestitaj; chiujoj societoj de esperantistoj estis perforte fermitaj. Post kelktempo la societoj remalfermighis, kaj nekomunistoj elighis el la societoj. En tiu chi jaro la komunist-esperantistoj pli bone laboris, ili organizis kaj malfermis la Tut-Ruslandan Esperantistan Kongreson kun granda sukceso.

Sed la komunist-esperantistoj ne povas unuigi chiuajn esperantistojn. Ekzemple en Moskvo ekzistas du grupoj: Unu nomas sin Sovietlanda Esperanta Unuigho (S. E. U.), estante la organizajho de komunist-esperantistoj, havante filiojn en multaj urboj; alia estas rusa filio de Sennacieca Asocio Tutmonda, eldonante revuon "La Nova Epoko." Tiu chi grupo unuigas diversajn revoluciajn elementojn; ghi havas nur organizaĵon en Moskvo.

Tiu chi fojon dum mi revenis trans Siberio, mi ekkonvinkighis, ke oni ne povas labori por simpla esperanta movado en Rusujo. En kelke da urboj la registaro malhelpis la movadon de Esperanto, sed post la organizo de S. E. U., la registaro indifereantas al nia movado. La Kongreso de Tut-Ruslandaj esperantistoj, okazinte en Augusto, sendis saluton al Lenin.

En multe da urboj la esperantaj asocioj estis fermitaj nur pro manko de mono—Char nun en Rusujo por fondi societon, oni devas pagi multe da mono por registrado, je la registaro.

Kiel oficiale rilatas la registaro al Esperanto? Ni povas scii de la ordono de popola komisarejo de edukado, ke instrui Esperanton en lernejo ne estas oficiala afero.

La bolshevikoj ne atentis al problemo de internacia lingvo, nur pro tio ke ili ne ricevis ordonon de Lenin. Mi chiam disputis kun multe da bolshevikoj, ili ofte respondis al mi per sekvantaj vortoj: "Kial Lenin ne pensas pri Esperanto?" La kauzo estas, kompreneble: Esperanto ja estas grava por bolshevikoj, sed Lenin kaj aliaj kondukantoj vagadis longtempe en alilando, kaj ellernis kelkajn alilandajn lingvojn. Ili jam ne komprenas la gravecon de internacia lingvo.
—Bao Pu.

LA NEKROLOGIO DE EDZINO. (Dua Premio en Konkurso de AEA)

"Vi estis mia edzo kaj vi estas mortinta.

Estas la filozofio, kiu mortigis vin.

Se vi estus aŭskultinta mian saĝecon anstataŭ la vian propran, vi ankoraŭ estus ĉagreno al mi kaj mi estus feliĉa.

La virinoj estas pli fortaj ol la viroj—ili ne mortas pro saĝeco.

Ili estas pli bonaj ol la viroj, ĉar ili ne elserĉas saĝecon.

Ili estas pli inteligentaj ol la viroj, ĉar ili scias malpli kaj komprenas pli.

La saĝaj viroj estas ŝtelistoj—ili ŝtelas saĝecon de la najbaroj.

Mi havis mil-kvarcent magivortojn—mia eta provizo—kaj vi ekŝtelis ilin ruze kaj lasis min senvalora.

Vi ŝtelis mian saĝecon kaj tiu estas ekrompinta vian kolon.

Mi perdis mian scion kaj mi tamen vivas, fikse regardante vian kadavron; sed ĝi estis tro peza al vi, mia eta saĝeco.

Vi neniam plu eliros en la pinarbaron matene, nek migros fremdajn landojn en stelriĉa nokto. Vi neniam plu sidos ĉe la flamfajro en malvarma nokto, ne enlitiĝos, nek ellitiĝos, aŭ faros nenion de ĉi tiu tago.

Kiu de nun kolektos pin-konusojn, kiam la fajro estingiĝas, aŭ vokos mian nomon en la senhoma domo, aŭ koleretos kiam la kaldrono ne bolas?

Nun mi estas vere sola. Mi ne havas saĝecon, mi ne havas edzon, mi ne havas ion plu por diri."

—El "The Crock of Gold," de James Stephens, tradukis Lauri Laiho.

EN LA G'ARDENO C'E SWAINTON

Najtingal' kantas ekstere,
en dom' oni ploras pro vi;
de tri mortintoj, fantomoj
promenas survoje kun mi;
de tri mortintoj—fantomoj, kaj vi estas unu de l' tri.

Najtingal' kantas arbare;
restas la mastro nun for;
najtingal' kantas, pepetas
pri amo daŭranta dum hor'.
Kvieta en ĉerko li kuŝas, la plej kavallira je kor'.

Jam du mortintojn mi konas,
kavalirajn, similajn al vi;
jam du mortintojn mi amas,
per amo eterna al mi;
jam tri mortintojn mi amas, kaj vi estas unu de l' tri.

De Lordo Tennyson; tradukis J. McCleverty.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Gis la 27 februaro ni ricevis la jenajn sumojn: A. Walford, 4/6, oktobro '24; F. Paulson, 5/-, augusto '24; Chocolate Bowl, 15/-; F. A. W. Thomas, 4/6, januaro '25; P. Leahy, 4/6, julio '24; S. Hall, 15/-, januaro '24; L. Laiho, 10/-; F. Bailey, 4/6, januaro '25; C. J. Martin, 4/6, januaro '25; kontantaj, 15/8; Raciista Grupo, 5/6, augusto '25.

GRUPOJ FILIIGITAJ AL A.E.A.

(Prezidanto: sinjoro W. H. King, Wellington, Nov-Zelando.)

Sydney: Esperanto-Societo. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.30—10 p.m. ĉe "Station House," Rawson Place (6a etaĝo). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro. F. V. Taylor; sekretario, S-ro. L. E. Fosto, adreso. "The Brighton," Croydon Park, Sydney.

Melburna Sekcio de A.E.A.: Vicprezidanto, S-ro H. Byatt; sekretario, S-ro P. T. B. Hudson. Poŝta adreso, Box 731, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Hardware Chambers, 350 Little Collins-str.; vendrede vespere, je la oka horo.

Berwick: Esperanta Grupo. Kunvenejo kaj poŝta adreso: ĉe F-ino P. Abbott, "Chelsworth," Normanby Rd., Berwick, merkrede je 3.30 p.m.

Dargaville: Esperanto Societo.—Prezidanto, S-ro Alfred Gregory. Sekretario, S-ro R. Pope. Poŝta adreso, P.O.; Dargaville, N.Z. Kunvenejo: la legosalono de S-ro A. Gregory, vendrede vespere, je la sepa.

B.E.S.—ADRESARO

5th Edition now to hand, 1/-.

6th Edition: Register your name among the Esperantists of the world. Price, 1/-.

Australian Agent: A. R. Cohen, 224 Barker's Road, Glenferrie, Melbourne.

VITAMIN.

Nature's remedy for physical and nervous exhaustion and disorders. . . See testimonials.

For Children and adults.

Price per packet: 3/8 posted.

Australian Agent: A. R. Cohen, 224 Barker's Road, Glenferrie, Mel-

Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

"Iru Antauen"-Grupo. Prezidantino: S-ino E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd., Oakleigh. Kunvenejo: 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere, je la oka horo.

Carnegie: Esperanta Grupo. Prezidanto S-ro Blundy. Sekretariino, F-ino L. M. Irwin. Kunvenejo kaj poŝta adreso, "Kirkcald," 10 Woorayl-str., Murrumbena, (du domojn for de la Carnegie Kinema-teatro) ĵaŭde vespere, je la oka horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidanto S-ro C. Casey, Sekretariino, F-ino F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard str., Victoria Park, W.A. Kunvenejoj vespere je la oka horo, James-str.: School, komencantoj marde; progresintoj, 9 Pier-str. ĵaŭde.

Persista Grupo, Armadale, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretariino: F-ino I. Thomas, Kunvenejo kaj poŝta adreso, 62 Northcote Rd., Armadale, merkrede vespere, je la oka horo.

Whangarei Grupo Esperanta. Prezidanto, S-ro D. Tilly. Sekretario, S-ro Chas. Waymouth. Poŝta adreso, ĉe S-ro Chas. Waymouth, strato Manse, Whangarei, N.Z. Kunvenejo: La domo de S-ro Tilly, strato Water, Whangarei, vendrede, je la oka horo vespere.

Raciista Esperanta kaj Diskuta Grupo. Prezidanto, sinjoro J. Skurrie: sekretariino, fraŭlino B. Adamson. Poŝta adreso, 673 Canning-str., North Carlton, Melbourne. Kunvenejo, Temperance Hall, Russell-str., Melbourne, ĵaŭde je la sepa horo.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str., ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.